

ESPERANTO

Internacia Revuo eldonata de Universala Esperanto-Asocio

1 9 4 6

39-a jaro N-ro 496 (4)

Julio - Aŭgusto

(Fondita 1904, ne aperis dum 1943-45)

Fondinto: H. Hodler, † 1920

Redaktoro: Hans Jakob
Palais Wilson
Genève, Svislando

ENHAVO:

UEA kaj IEL kunfandiĝas	25
Esperantista Interhelpo	26
Elmigro de Familio Zamenhof	26
Esp. helpo en Svedlando	26
Esperanto en URSS	27
Enciklopedio de Esperanto	27
Kie estas kiu?	28
Universala Esperanto-Asocio	
Oficiala Informilo 4	29-30
Internacia Korespondado	31-32
Petoj kaj proponoj	32

Jara abono	Fr. sv. 10.—
(Kun ricevo de la jarlibro & premio)	
. Anonco:	
Korespondado du linioj	1.—
. Reklamo:	
Kolonero unu centimetra	1.—

Poŝtĉeko svisa:	Genève I 2310
Poŝtĉeko belga:	Bruxelles 184200
Poŝtĉeko franca:	Lyon 221-76
Poŝtĉeko sveda:	Göteborg 44381

Bokförlaget Kosmos
för Universala Esperanto Asocio

Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Esperanto-Ligo kunigas en Universala Esperanto Organizacio

Estas kun sincera ĝojo, ke ni povas anonci hodiaŭ la finon de l'organiza disputo kaj definitivon solvon de problemoj kiel unuigi la du organizaĵojn, UEA kaj IEL. La intertraktado daŭris kun ioma interrompo de januaro ĝis aprilo kaj interkonsento pri la ĉefaj detaloj principaj estis subskribita la 21-an de julio en Berno, loko de la venontjara Universala Kongreso de Esperanto.

La proponoj kiuj kondukis al la interkonsento estas nenio alia ol ponto inter du perceptoj en nia movado. Ĝi rekonas faktojn kiel realaĵojn ne plu forigeblajn, respektas tradicion kaj liberigas la vojon al fruktodona laboro. La ĉefaj karakterizaĵoj de la estonta organizaĵo estas la harmonia kunfandiĝo de du branĉoj, nome la propagand-varba-instrua kun la aplik-uzad-serva.

La komisiitoj de la du organizaĵoj UEA kaj IEL post klarigo de diversaj dubaj punktoj kunvenis en kunsido, prezidata de D-ro Privat. Jena resuma protokolo formulas la rezultaton de la diskutoj.

Kunveno okazis en Berno 20/21-an de Julio 1946 inter reprezentantoj de UEA kaj IEL por interkonsenti pri kunfandiĝo de la du organizaĵoj kaj tiamaniere ĉesigi la duecon en la Esperanto-movado. Post du tagoj de tre amika diskuto oni trovis favoran bazon nun submetotan al la du komitatoj. La trovita interkonsento respondas al la celoj de la du partoj de la movado kaj certe ĝojigos la tutan esperantistaron. Partoprenis S-roj Goldsmith, Hans Jakob, Kürsteiner, Rotach kaj prezidis D-ro Privat.

Por klare kompreni la etendiĝon de l'Akordo ni donos priskribon en venonta numero de la situacio, de l'eblecoj kaj de l'estonteco de la agado por Esperanto, en konciza artikolo. Hodiaŭ ni diru nur tion, ke ambaŭflanke evidentigis sincera volo finiĝi staton ne plu korespondan al postulo de l'tempo: Pacon por homoj de bona volo!

Hans Jakob

Esperantista Interhelpo

Ĉiutage ni ricevas nun petojn insistajn por helpi per sendo de nutraĵoj. Je nia granda ĉagreno ni devas lasi ĉi-tiujn petojn sen respondo. Proprajn rimedojn por tiu-ĉi celo ni jam ne plu havas kaj organizi monkollekton estas malkonsilinda pro jenaj motivoj:

1) En ĉiuj landoj estas farataj monkollektoj kun metoda reguleco, por helpi la militviktimojn kaj la organizantoj de tiaj kolektoj renkontas pli kaj pli kreskantan inertecon de l'publiko.

2) Monkollekto ekster Svislando, supozante ke ĝi sukcesos, ne permesos ankoraŭ, ke oni povu libere disponi pri la mono, ekzemple por transigi ĝin en alian landon.

3) La nombro de landoj „bonaj“ fariĝis malgranda kaj ĝuste en unu el ĝi, la plej bona, la nombro de l'esperantistoj estas sen-signifa, kaj malsendo nebla por la momento.

Pro tiuj motivoj ni devas rezigni organizi helpon per niaj organoj. Sed ni proponas alian sistemon. Ni konigas la adresojn de samideanoj, kiujn ni scias en granda mizero. Esperantistoj en situacio povantaj „adopti“ malsatantan samideanon en Centra Eŭropo bonvolu tion fari. La Esperantista Interhelpo estas preta peradi la sendon, se rekta rilato ne estas ebla. Ni konsilas el propra sperto la sendaĵojn de la „CARITAS“, Löwenstrasse 3, Luzern poŝtekkonto VII-11007.

Jen listo de kelkaj samideanoj petegantaj helpon. Pri ilia fidindeco rilate al nia idealo ni garantias.

1) S-ro Gottlieb Strössner, Dietramszellerstr. 10-II-r., München 25. (72 jaraĝa, sen laborgajno aŭ rento; esperantisto de 1910).

2) S-ro Franz Frühwirth, lernejestro pensiita, Schwertberg 38, Oberösterreich, Aŭstrio.
(Petegas je sukero, ĉokolado, teo).

3) S-ro August Omlor, Beethovenstr. 24, Sankt Ingbert, Saar-Sarre. (Malnova samideano, neniam ŝanceliĝinta dum 13 jaroj da suspekto, ĉikano kaj teroro).

4) S-ro Julio Baghy, Rottenbiller utca 66-I-20, Budapest VII. (Nia ŝatata poeto-verkisto estas en vera mizero)

5) F-ino Olga Szobonya, Révai u. 6h, II-1, Szeged, Hungarlando. (... kaj unu etan pecon da ĉokolado, ĉar mi ne manĝis plu tian de antaŭ 3 jaroj!)

6) S-ro D-ro A. Halbedl, Schmittgasse 15/I, Knittelfeld, Steiermark, Aŭstrio.
(Deziregas nutraj-pakaĵojn kaj repagus la koston)

7) S-ro Max Wiesner, Schwaney 124, (21a) Paderborn-Land, German., Britische Zone, skribas:

„Kie! malnova esperantisto, ankoraŭ koninta D-ron Zamenhof, mi permesas al mi la nemodesta peto, ĉu ne estas ebla, ricevi per unu el viav klubanoj tra la „Christl. Nothilfe“ Zürich, Dufourstr. 71, paketon da kafo, teo ktp. Kiam la germana mono denove valoros eksterlande, mi volonte repagos la koston aŭ jam nun mi povus sendi bonajn poŝtmarkojn de la angla regiono. Mi estus tre dankema kaj mi salutas vin tutkore.“

Elmigro de Familio Zamenhof.

Okaze de la kunveno de l'UEA estraranoj kaj la ĝenerala sekretario de IEL S-ro Goldsmith en Bern, 20/21-VII-46, oni ekzamenis la demandon pri elmigro de S-ino Zamenhof, filo Ludoviko kaj la fratino de S-ino Z. Estis decidite entrepreni ĉion ke la tri personoj povu veturi Usonon kiom eble plej baldaŭ. Sinjoro Goldsmith certigis la helpon de britaj esperantistoj. La Esperantista Interhelpo informas la esp. publikon pri la plano de tiu-ĉi elmigro. Intertempe anonciĝis plia helpo pere de bonvola samideano usona. La agadon grave malhelpas la antediluvia poŝta servo kun Polujo; aerpoŝta letero ekzemple bezonas inter 2—3 semajnoj por alveni en Varsovio de Genève. Plia baro por eniri Usonon estas la kvot-sistemo, laŭ kiu ĉiujare nur difinita nombro de personoj estas enlasataj. Estas nia intenco atingi ke la familio Z., povu veni Svislandon kaj atendi tie-ĉi la enir-vizon.

Nutraj-sendaĵoj per CARITAS, Luzern, Svis.

Löwenstr. 3 — Poŝtekkonto VII-11007

Ekzistas diversaj tipoj, sendeblaj al Aŭstrio, Germanujo, Hungarlando. La pakaĵoj jam troviĝas en la koncernaj landoj. Ĉia garantio pri korekta liverado. Laŭ peto ni sendos prospekton kaj ĉian informon. Plej uzata sendaĵo estas „Typ Suisse“, kiu enhavas 1 kg da kristalsukero / 500 gr da kafo kruda / 3 skatoloj da sardeloj / 453 gr viandkonservaĵoj / 463 gr laktopulvoro aŭ 1 kg kondensita lakto / Pezo 3 kg — Prezo 15 Fr. sv. sendo, asekuro inkludita.

Esperantista helpo en Svedlando.

Sveda Helpkomitato por Nederlandaj Esperantistoj, kies prezidanto estas la ĉefdelegito de UEA — Einar Adamson — dum la monatoj januaro-marto 1946 sendis pli ol 1000 kilogramojn da vestaĵoj al nederlandaj esperantistoj, 200 paroĵojn da ŝuoj kaj manĝaĵojn.

Kiel reprezentanto por UEA, — Einar Adamson — por Internacia Helpo sendis dum la milito manĝopaketojn al Norvegujo kaj dum la lasta tempo vestaĵojn al la norda parto de Norvegujo kaj al Finnlando.

Redakcia noto.

La artikolo „La popolmigrado kontraŭvola“ en no. 495 havigis al ni aron da respondoj. Sinjoro Jandik el Pardubice sendis informan artikolon, laŭ la vidpunkto de l'unuaj trafitoj de l'deviga popolmigrado, la ĉeĥoj, slovakoj kaj poloj. Pro la principo de l'temo (verdire la vorto „temo“ ne estas taŭga) ni revenos en venonta numero pri tiu-ĉi okazaĵo.

Redaktoro.

Esperantismaj problemoj

II.

Esperanto en URSS.

En la „Pozitiva programo“, kiun ni skizis en „ESPERANTO“ no 494, ni citis kiel unuan programeron, la taskon iamaniere atingi, ke nia movado estu tolerata en la Unio de l'Sovetaj Respublikoj. La esperantista publiko plejgrandparte malkonas la veran situacion. Utilas ke ni mallevu la vualon de forgeso kovranta tiun ĉi ĉapitron de nia historio por ke oni komprenu la amplekson de l'tasko kiun ni aludis. La plimulto de la nunaj esperantistoj ja ne povas scii „kio estis“.

Nia movado, aŭ se oni preferas, nia lingvo, naskiĝis ja en la landaro, oriente de l'Odra rivero. D-ro Zamenhof vivis en epoko, kiam Polujo estis sub cara regado; li mem uzis la rusan lingvon, vera peradlingvo en la multidioma rusa regno. La unuaj discipuloj de nia Majstro estis poloj, rusoj, latvoj, estonoj, kaŭkazianoj kaj judoj, ĉiuj regnantoj de l'imperio rusa. La rusa epoko de nia movado finis kiam fondiĝis naciaj esp. societoj en Francujo, Germanujo kaj Britujo, landoj kiuj depost 1905 prenis decidan rolon en la movado. La sinteno de la cara registaro al Esperanto ne estis unusenca. Apud tre liberala tolero ni vidis ankaŭ okazaĵojn de eksterordinara severeco, ekzemple dum la unua revolucio en 1905. Tiam aro da esperantistoj estis arestitaj, pro pretendita perfido de militaj sekretoj. Ni rimarku, ke ne malmultaj profesiaj militistoj rusaj aktive partoprenis la movadon.

Aperis ĝis 1917 rusa esp. gazeto „Ondo de Esperanto“, intime ligata kun la nomo de l'eldonisto A. A. Safarov en Moskvo. En Arĥangelsk kaj en Irkutsk, en Vladivostok kiel en Tiflis estis ege aktivaj grupoj por nur indiki kvar angulojn de l'giganta imperio. La gravecon de l'afero montras alia fakto: ESPERANTO la gazeto de UEA havis pli ol 500 abonantojn (sen la ponumero aĉetitaj eksempleroj) kaj du oficistoj en la Centra Oficejo en Genevo sekvis kurson de rusa lingvo por kompreni kaj skribi rusajn adresojn!

Cio tio ŝanĝis post 1917! Iom post iom restarigis la movado, la soveta registaro favoris iom la instruadon, ja eĉ konata rusa esperantisto laboris en la komisariejo por popolklerigo. Gramatikoj de nia lingvo estis presitaj laŭ ordono kaj je risko registara. Internacie la soveta registaro subtenis ĉion kio povis oficialigi la uzon de Esperanto.

Nature la movado ne plu estis sendependa aŭ neŭtrala kiel oni kutimis diri. Ĝi adaptiĝis al la reganta reĝimo kio kondukis rekte al la postulo de l'esperantista diktatoro, E. Drezen ke UEA akceptu nur Delegitojn aprobitajn de la Soveta E-Unuiĝo. Kion UEA malakceptis (1923). La progreso de SAT (erare konsiderita kiel nur-komunisma organizaĵo!) en si mem nuligis ĉian agadon en la kutimita formo.

Panta rhei, ĉio fluas! La esperanto-favora tempo, kio kondukis eĉ al eldono de poŝtmarkoj por kaj en Esperanto forpasis.

SAT fariĝis same viktimo de l'nova fluo kiel siatempe UEA. Kaj fera kurteno hermetike fermas la sovetan landaron kontraŭ influo internacia. „Ni ne volas internaciulojn“ estas la gvidvorto de l'nova naciismo soveta. Malofte tre malofte atingas nin esp. letero, tomba silento etendiĝas de limo pola ĝis la Flava Maro. Esperanto fariĝis malkonata afero, spite ĉiaj provoj restarigi ĝin.

Konkludo.

Estas stato nekomprenebla, ke en regno tiom grava, kultura movado kiel la nia, estas tabua. La kutimaj rimedoj, influi tion

de supre, dum internaciaj ŝtatoficialaj kunvenoj, tiufoje ne estas sekvendaj ĉar kondamnitaj al fiasko. Eble montriĝas vojo per rea provo de interŝtata akordo pri la instruado de Esperanto en regnoj interesitaj. La fakta ne-ekzisto de E. en URSS ja de si mem malebligas klopodadon flanke de enlandaj esperantistoj. Utile kunhelpi je la revivigo de nia afero en URSS povos niaj amikoj en slavaj landoj, Ĉeĥoslovakio, Polujo, Jugoslavio kaj Bulgario. Estas al ili nun, sin esprimi pri tiu-ĉi problemo.

H. J.

Enciklopedio de Esperanto.

La amplekson de nia movado nenion ilustras pli bone ol la miloj da datoj, faktoj, okazaĵoj, kiujn devas koni hodiaŭ aktiva esperantisto, ne parolante de la miloj da personoj, pioniroj, verkistoj, kaj aliaj aktivuloj. „Kiu estis Profesoro Cart, ?, „Kion signifas Cefeĉ — ŝlosiloj?“ „Kiu estis unua propagandisto en Venezuelo?“ jen demandoj, kiujn respondas fideinde la ENCIKLOPEDI DE ESPERANTO.

Laŭ iniciato de rusa esperantisto, Sirjaev kiu mem redaktis grandan parton de artikoloj, finredaktis ĝin samideanoj Bleier kaj Kökeny en Budapeŝt, helpataj de aro da kunlaborantoj. Ĝis 1934 aperis du volumoj, A—Z, en la kutima leksikona formato. La amplekson de la laboro kaj la riĉecon de l'enhavo ilustras jenaj ciferoj:

Artikoloj pri personoj: 1559; Libroj: 482; Gazetoj: 105; Lingvoj: 42; Landoj: 79; Urboj: 47; Organizo: 68; Aliaj: 125; Resendoj: 203. Kune 2710 titoloj, formantaj mil paĝojn da teksto. Kaj kelkcent ilustraĵoj plej diversaj.

Enciklopedio neniam estas kompleta, ĉiam mankas io. Kaj ĉe nova verko, kies kompilintoj ne povis bazi sian laboron sur faritaj spertoj, tiaj mankoj ja abundas. Tion konsciis ankaŭ la eldoninto Bleier Vilmos kaj li decidis aperi trian volumon, kies redaktadon li konfidis al Hans Jakob. La tria volumo devis aperi en 1937 aŭ 1938 kaj regule senhalte amasiĝis en Genève la tekstfolioj, bildoj, dokumentoj. Riĉega fonto por ĉia esploro estas la arkivoj de UEA kaj ĝia biblioteko, la giganta aktaro kolektita en Genève depost 1907.

La teksto de la tria volumo estis preta. Pro la konataj cirkonstancoj, Bleier intencis presigi la libron en Japanujo aŭ en Ŝangĥaj. Malfeliĉe la materialo sendita de Budapeŝt al oriento malaperis, kio dank'al la ekzisto de kopio estis rebonigebla, kvankam aro da valoraj dokumentoj fotografotaj, perdiĝis.

Cion tion haltigis la milito kaj la morto de la eldonisto Bleier. Kaj la milito metis kvazaŭ historian finstrekon. Ni rekomencas novan epokon. Kaj despli necesas dokumenta libro, kiu informas pri la okazintaĵoj post 1932.

La redaktoro de la tria volumo nun kompletigas la pretan materialon kaj metode ekzamenas ĉion. Laŭ prudenta kalkulo, tiu ĉi materialo estos preta post unu jaro. La neebleco eldoni tian libron nun en Budapeŝt trudas la devon, trovi eldoniston por tiu ĉi librego. Utilajn sciigojn oni komuniku al la redakcio. En venonta numero de ESPERANTO ni aperigas kelkajn tekstmodelojn pri artikoloj aperontaj en tiu ĉi tria volumo.

Hans Jakob, Redaktoro de la E. d. E.

Kie estas kiu?

Servo de reserĉado de UEA.

Por informi la esp. publikon pri samideanoj dislokitaj, forpelitaj, elmigrintaj k. t. p. ni kreis tiun-ĉi servon. Ĝi jam utilis retrovi personojn kaj ni invitas ĉiujn kompletigi tiun-ĉi liston per taŭgaj informoj.

Kvara listo

S-ro Fritz Bachmann, D de UEA ĝis la jaro 1936, nuna adreso: (14-a) Heilbronn am Neckar, Osswaldstrasse 6-1 (Amerikan. Zone).

Prisonnier de guerre Erich Bär, No. matr. 1 610 789, Dépôt de P. d. G. 135, Clermont-Ferrand, Puy-de-Dôme (France).

S-ro D-ro Ing. Edmund Bartsch, estinta delegito de UEA en Berlin, nun: (24) Lübeck-Travemünde, Steuerbord 4-6 (Britische Zone).

S-ro Paul Bennemann, kompilinto de vortaro kaj de valoraj verkoj, LK-ano, savigis. Nuna adreso: Tiefe Strasse 5, Leipzig 05 German., Rusa Zono.

S-ro Friedrich Bierhoff, DM de UEA, nuna adreso: (17b) Ueberlingen Bodensee, Hof Lenzfried (Franz. Zone).

Sinjoro Profesoro Paul Christaller, pioniro de Esperanto en Germanujo, kompilinto de la konata vortaro, nun: Immenhoferstr. 14, Stuttgart, Amerikan. Zone.

S-ro L. Dederichs, malnova esperantisto kaj estinta ano de UEA nun: (20) Hannover-Hainholz, Am Hopfengarten 4-I, Britische Zone.

S-ro D-ro Béla Doczy, advokato, esperantisto el Budapeŝt, internita en: (13/A) Metten in Bayern, Kloster, 1. Stiege, 1. Stock no. 27. German., (Amerikan. Zone).

Sinjoro Friedrich Ellersiek, la konata Esperanto-eldonisto en Berlin, nun: Russische Zone, (15) Frauenwald in Thüringen, Schliessfach 14.

Sinjoro Felix Epstein, malnova batalanto por nia afero, posedinto de unu el la plej riĉaj kolektoj de dokumentoj pri internacia lingvo revenis el koncentrejo Theresienstadt post 3 jara malliberigo, nun: (24) Hamburg 13, Böttgerstr. 13, Brita Zono. Lia valorega biblioteko estis komplete detruita.

S-ro Rudolf Michael Frey, malnova batalanto por nia afero, Wien III-40, Seidlgasse 39-11.

S-ro Alois Jauernig, estinta prezidanto de la grupo en Krnov (iama Jägerndorf) en Ĉeĥoslovakio, nun — (15) Neustadt (Südharz) German., Burgstrasse 96a. (Russ. Zone).

F-ino Marie Laade, Mariendorferstrasse 34b, (1) Berlin-Steglitz deziras koni la nuntempan adreson de S-ino Shorter, lasta adreso 47 York Road, Ilford, Essex, Angl.

S-ro Fritz Lowitzer, eks-Del. de UEA en Bingen am Rhein, nun: (18) Bingen am Rhein, Mainzerstrasse 12, (Franz. Zone).

Prisonnier de guerre Gerhardt Kriedel, eks-delegito de UEA en Langburkersdorf, Saksio, nun: Dépôt des prisonniers de guerre no. 28, Reims, Francujo.

S-ro A. Margules, reveninta el Sovjetio, nuna adreso: Papiernikowa, ul. Slowackiego 12- m. 42, Szczecin, Polujo (Szczecin-Stettin).

S-ro D-ro A. Mildwurf, esperantisto el Vieno: 189 Sumatra Rd., London N. W. 6.

S-ro August Omlor, Oberamtsanwalt, DM de UEA, estinta Delegito en St. Ingbert Saar, German., Beethovenstrasse 24 (Zone française).

S-ro Victor Pinagel, DM de UEA kaj longjara Delegito en Aachen (Aix-la-Chapelle, Aquisgrano) nun: (15) Jena-Ost, Thüringen, Lodystrasse 4, bei Oswald (Russ. Zone).

Obergefreiter Paul Posern, (el Saksio) militkaptito. PoW 31 G — 1 132 434 U.S. Army, (France) — Petas ke oni informu maljunan patrinon:

S-ino Anna Trescher, Döbeln, Sachsen, Zwingerstrasse 41, Russ. Zone pri lia nuna adreso.

S-ro A. B. C. Senff, malnova ano de nia movado kaj de UEA el Hamburg, nun: (21a) Lage-Lippe, 3 Technikumstrasse, im Hause Dr. Traupe. (Britische Zone).

Sinjoro Inocento Serisev, ortodoksa pastro, rifuĝinta al Japanujo, poste Aŭstralio, nun: Box 2988, N. N. G. P. O., Sydney, Aŭstralio.

P. o. W. Joachim Stichel, Gef. Nr. 31 G 1 820 290 H., 8276 Hosp. (Prov.) P. o. W. 5th Labor Supervision Area A. P. O. 772, U. S. Army.

S-ro Hermann Theobald, tre aktiva samideano en laborista medio, Hamburg — Gross Flottbek, im Hag 18, Brit. Zone.

S-ro Vincze Toth, polica subkolonelo, suferinte ĉikanojn kaj persekuton de la forigita reĝimo, reaktivigis. Adreso — Budapest III, Jolsva u. 4.

Militkaptito Oberleutnant Stefan Wabra el Ĉeĥoslovakio — Görkau, Lindenstr. 68 nun: P. o. W. no. B. 985 878, 602 G. G. T. Coy., A. J. P. o. W. Camp Napoli, Italio.

S-ro Alfred Zentgraf, eks-delegito de UEA, nun (15) Meiningen Thür., Luisenstrasse 2, (Russ. Zone).

Oni petas informon!

En tiu ĉi rubriko ni publikigas petojn de samideanoj serĉantaj familianojn perditajn, dislokitajn aŭ rifuĝintajn. Laŭeble oni informu la petinton rekte.

S-ino Alice Czeika, el Teplice-Sanov (Teplitz-Schönau, ĈSR, nuntempe en Linz-Urfahr, Riesenhof (Aŭstrio) serĉas fraton, de kiu ŝi estas sen novaĵoj. Supozeble fariĝis militkaptito dum la militagoj en regiono de Laa an der Thaya, Aŭstrio, Aprilo 1945.

La karikaturisto Dragutin Wranka (kies karikaturoj en la PRAKTIKO multe amuzigis la esperantistojn) troviĝas nun en Kufstein (Aŭstrio) D. P. C. Camp, Team 199. Li serĉas parencojn en New York City sub la nomo Mario Puratich, lasta adreso: 510 Rosedale Ave, aŭ 27 West 181 street. Utilajn intervenojn de lokaj samideanoj dezirataj.

A. Davidoviĉ, (eks-delegito de UEA en Ĥust, Ĉeĥoslovakio. Subkarpata Rusio) nun en Bucuresti, Ruman., str. Olteni 19, serĉas du infanojn, Elza kaj Tibor, naŭ-kaj sesjara respektive. Deportitaj al Auschwitz-Oswiecim kaj nenion plu oni sciigis.

F-ino Palmyre De Cock, Pieter Conckestraat 2, Aalst, Belgujo, ŝatus ricevi informojn pri Lucie De Cock, areŝtita de la GESTAPO la 22-3-43 kaj vidita lastfoje la 21-3-1945 en la kampo de Mauthausen, Aŭstrio. Personoj kiuj estis en tiu-ĉi kampo, bonvolu tion anonci al UEA.

Antonius Aloysius Suerink, samideano el Waenaar, Nederlando, Louisastraat 13, petas informojn pri la mortkialo de sia filo Antonio Suerink, nask. 1922, en Diepenveen, Nederlando, mortinta 17-an de Marto 1944 je la 8-a horo en Konzen-trationslager Buchenwald b. Weimar, no. 28 826, Block 17, elektro-muntisto. Petegas ĉiun kiu povus doni informojn kaj volonte repagos kostojn.

Rimarko: Skribante adreson en Germanujo, oni ne forgesu meti antaŭ la loknomo la poŝtgid-numeron en krampoj, bone videblan, plie la okupacian zonon: Amerikan, britan, francan, rusan.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

PALAIS WILSON - GENÈVE (SVISLANDO)

Oficiala Informilo 1946 (4)

Adreso de UEA. Gis plue validas la sama adreso, Palais Wilson, Genève, telefono 2 30 34. Personoj dezirantaj renkonti la Administranton bonvolu sin anonci antaŭe por fiksi tempon de rendevuo.

Bela donaco — Sinjorino Stroelee, edzino de nia multŝatata recenzisto Georges Stroelee, † 1944 donacis al UEA por la Esperantista Interhelpo, la riĉan bibliotekon esperantistan de sia edzo, por helpi al esp. grupoj en landoj ruinigitaj. Ni kore dankas por tiu ĉi valora donaco.

Delegitoj de UEA. — Gojige anonciĝas delegitoj kaj mankas al ni la spaco por konigi novajn lokojn kun delegitoj ĝustatempe. Decide UEA restariĝas dank'al bonvola kunlaboro de fidelaj amikoj.

Tria listo.

Baĉ'ovany (C. S. R., Slovenio)

D.: Ludovit Bugár, pentristo, ĉe Baĉ'a. VD: Stefan Szabo, Baĉ'a zasob. oddel.

Bratislava (C. S. R., Slovenio)

D.: Frant. Duriáč, sekretario de Slovaka Esperanto Societo, Jenesského 78.

VD.: Stefan Maretta, Statoficisto, Prayova 11 B.

Cadca (C. S. R., Slovenio)

D.: Otto Weimer, oficisto, Adame-Lošonsky.

Caluire-Cuire (France, Rhône)

D.: F. ino B. Clavier, instruistino, 25 Rue Jamen-Grand.

Dolný-Kubín (C. S. R., Slovenio)

VD.: Josef Gebauer, stanica NB.

Frankfurt am Main (Germanujo)

D.: Carl Barthel, interpretisto, Wöhlerstrasse 14/2.

Camenica nad Hronom (C. S. R., Slovenio)

CD.: Jozef Jablonsky, direktoro de lernejo.

Köbenhavn - Ø. (Danlando)

D.: A. P. Dueholm, Bryggervangen 4.

(22a) **Köln am Rhein** (German., Brit. Zone)

D.: August Fehr, instruisto, Weingarten 28, Köln-Poll.

(10) **Löbau in Sachsen** (German., Russ. Zone)

D.: Klemens Wiczorek, Töpferberg 1.

Lutise, okres, Kys. Nové Mesto (C. S. R., Slovenio)

D.: Julius Vančo, instruisto.

Markušovec-Spiš (C. S. R., Slovenio)

D.: Jozef Baran, oficisto, Drev. Banský priem.

VD.: Jozef Beluško, oficisto, Drev. banský priem.

(19) **Naumburg a. d. Saale-Ost** (German., Russ. Zone)

S. ino Eleonore v. Madai, Hildewartstrasse 15, L., PK pri best-zorgado.

(18) **Neustadt-Haardt** (German., Franz. Zone)

D.: Hans Kraul, maŝinteknika metiisto, Krimhildestr. 19.

Nimnica, okres Puchov nad Vahom (C. S. R., Slovenio)

D.: Jan Mikušec, studento.

Nový Smokovec (C. S. R., Slovenio, Tatry)

D.: Jozef Panoč, U. S. P. 306.

Odorin p. Markušovec (C. S. R., Slovenio)

D.: Jozef Kristek, komercisto.

Oravský Podzámok (C. S. R., Slovenio)

D.: Rudolf Šiška, stanica NB.

VD.: Julius Benický, studento.

Pohorela, okr. Brezno n. Hron (C. S. R., Slovenio)

VI.: Ondrej Baran, „Ocell'ovy dom“.

Poproč (C. S. R., Slovenio)

D.: Eugen Grich, direktoro de lernejo, poŝta Jasov.

Prešov (C. S. R., Slovenio)

D.: Andrej Beisetzer, oficisto, Šturova 14.

Pčruba, okr. Prievidza (C. S. R., Slovenio)

D.: Em. Cavojsky, komercisto.

Povazská Bystrica (C. S. R., Slovenio)

D.: Emil Chut'ka, ŝtat. priem. ŝkola.

VD.: Emarue! Malinovsky, junak, ĉ. d. 63.

Rosina (C. S. R., Slovenio)

D.: Alojz Babik, tajloro.

(19) **Schönebeck an der Elbe** (German., Prov. Sachsen)

D.: Walther Gieseler-Fischer, Böttcherstr. 33 (Russ. Zone).

Selestat (France, Bas-Rhin)

D.: Ing. Zimmermann, 3 Chemin du Haydn.

Sereď (C. S. R., Slovenio)

D.: Jan Kratochvila, lerneja direktoro.

VD.: Imrich Farsky, oficisto, Cukrovar.

Slanica okr. Namestovo (C. S. R., Slovenio)

D.: Daniel Papák, konstruero.

Smolenice okr. Trnava (C. S. R., Slovenio)

D.: Melania Dusikova, oficistino.

Spišská Nova Ves (C. S. R., Slovenio)

D.: (elektota)

VD.: Frant. Kramar, Mlynska 13.

Svinna, okr. Zilina (C. S. R., Slovenio)

D.: Dominik Jamečný, metiisto.

Tisovec, Gemer (C. S. R., Slovenio)

D.: Gustav Krivoš, ŝkifabrikisto.

VD.: Gustav Strba, lokomotivestro.

Toulouse (France, H-te Garonne)

D.: F. ino Louise Castel, 9 (25) Rue Jacques Laffitte.

Töreboda (Sved.)

D.: Frits Lindén, Kungsgatan 2.

Trebišov (C. S. R., Slovenio)

D.: A. Rusnáková, oficistino, Parný mlyn.

Trenčianska Teplá (C. S. R., Slovenio)

D.: Frant. Zaťkulak, sukerajsto, Cukráren.

Trenčín (C. S. R., Slovenio)

D.: Tibor Schellberger, profesoro, Orechové 207.

VD.: Jan Lamačka, oficisto, Kukučínova 1524.

Varin, okres Zilina (C. S. R., Slovenio)

D.: Emanuel Hanus, skoltestro, ĉ. d. 287.

(22b) **Unkel am Rhein** (German., Franz. Zone)

D.: R. Brinkmann, restoraciestro, Bahnhofsgaststätte.

Vienne (France, Isère)

D.: André Moussier, 160 Rue d'Avignon.

✓ **Viglaš**, okres Zvolen, (C. S. R.)

D.: Jan Antošik, ŝtata instruisto.

✓ **Zavod**, okres Malacky, (C. S. R., Slovenio).

D.: Pavol Surina, oficisto, ĉ. d. 279.

✓ **Zvolen** (C. S. R., Slovenio).

D.: Albert Uhljar, lokomotivestro, ŝtata domo.

Germanujo. — Regule alvenas nun korespondadoj el Germanujo, parte germanlingve parte en Esperanto. Ni respondas al ĉi, sed vidigas ke pro motivo al ni nekonita iaj sendaĵoj, precipe el la Amerikana zono estas resendataj de la cenzuro, sen klarigo, kun kvarlingva etikedo „Returne al sendinto“. La korespondado laŭdire limigas al privat-aferoj, supozeble nur pri plej elementaj aferoj.

Korespondado — Pro akcidenteto de Predaktoro prokrastiĝas respondo al korespondadoj alvenintaj dum monato Aŭgusto.

Reprezentanto en Slovakio — Ni informas niajn amikojn en Slovakio pri la elekto de Honora Reprezentanto en la persono de

S-ro Arnošt Vána, en Zilina, Pivovarska 3, Dumviva Membro de UEA. Li estas rajtigata agadi kiel ĉefdelegito por Slovakio, C. S. R.

Peranto por Italio — Ĝis alia arango akceptas ĉiajn pagojn por UEA en Italio:

Prof. P. Modesto Caroli, Mirandola, Modena.

Parizo — Oficas kiel ĉefdelegito por la metropolo Constantin Naoumoff, ingeniero, 3 Ave. Général Laperrine, Paris 12, Tel. DOR. 68-53 (de la 20a ĝis 6-a h.)

Komitato de UEA 1946

✓ Adamson, Einar, redaktoro, 18 Värmlandsgatan, Göteborg, Sved.
✓ Atanasov, Atanas, A. agronomo, Aleks. Konstantinova 14, Sofia, Bulgar.

✓ Baghy, Julio, Rottenbiller u. 66-1-20 Budapeŝt VII, Hungar.

Bernaldo Luzo, Rua David de Sousa, 24 r. c. Lisboa, Portug.

Chagnoux, Daniel, prefekteja diviziestro, 10 Rosa Bonheur

✓ Yzeure (Allier) Franc.

✓ Czubrynski, D-ro Antony, Zachodnia 10, Wochy pod Warszawa, Pol.

✓ Dubin, Joseph, 34 S. 16 th Street, Philadelphia, Pa. U. S. A.

✓ Jakob, Hans, Federala oficisto, Palais Wilson, Genève, Svis.

✓ Kamaryt D-ro Stanislav, prof. em. Chotebor, Ĉeĥoslovakio.

✓ Klajic, Radomir, ŝtatoficisto, pens., Svetag Save 23, Beograd, Jugosl.

✓ Kürsteiner, Hans, Florastrasse 5, St. Gallen, Svislando.

✓ Rosen, Charles, 73 rue Léopold Robert, La Chaux-de-Fonds, Svis.

✓ Rotach, H. G., korespondisto, Parkstr. Wabern b. Bern, Svis.

✓ Setälä Vilho, fotografiisto, Onnenkatu 23, Helsinki Kā, Finnlando.

✓ Soeters, P. J., Kuiperstraat 25, Zutphen, Nederlando.

Thomson, A. W. 35 Dallin Road, Bexleyheath, Kent., Brit.

✓ Vána, Arnošt, Pivovarska 3, Zilina, Slovenio, Ĉeĥoslov.

Slosiloj de Esperanto. — Aperis tia en finna lingvo. La kolekto nun enhavas 11 jenajn lingvojn: Albana, Angla, Araba, Baska, Ĉeĥa, Dana, Estona, Finna, Flandra, Franca, Germana, Hispana, Hungara, Islanda, Itala, Japano, Juda, Malaja, Nederlanda, Norvega, Portugala, Persa (= Irana), Romanĉa, Rumana, Rusa, Slovaka, Slovena, Sud-afrika, Sveda. Entute 29 lingvoj. Ne plu estas riceveblaj, tiaj en Bulgara, Kroata-Serba/Serb-Kroata, Latva, Litova. Pola kaj Ukraina.

Kotiz-tabelo kaj pagmaniero

Estas citataj nur la landoj atingeblaj. Abono sen membreco, sama prezo kiel MA.

	Mono	MJ	MA	MS
Argentinio	Pes.	2.50	7.25	20
Aŭstralio	Ŝil.	4	10	25
Aŭstrio	Ŝil.	5	12.50	30
Belgio	Fr.	50	100	250
Brazilio	Milr.	12	30	80
Britlando	Ŝil.	4	10	20
Bulgarujo	Leva	100	250	600
Ĉeĥoslovakio	Kē.	25	60	200
Ĉinujo	Dol.	3	7.50	20
Danlando	Kr.	5	10	20
Egipto	Ŝil.	4	10	25
Finnlando	Fmk.	50	100	250
Francujo	Fr. fr.	50	100	250
Hispanujo	Pes.	8	20	50
Italujo	Lir.	50	100	250
Jugoslavio	Din.	50	125	300
Nederlando	G.	2.50	5	10
Novzelando	Ŝil.	4	10	20
Palestino	Ŝil.	4	10	20
Portugalo	Esk.	15	40	100
Rumanio	—	—	—	—
Svedlando	Kr.	5	10	20
Svislando	Frk.	5	10	20
Urugvajo	Pes.	2.50	5	20
Usono	Dol.	1	2.50	5

Al kiu oni pagu:

✓ CD: Daniel Quarello, Casilla de Correo 47 (Suc. 13) Buenos-Aires
Rekte al C. O. de UEA.
✓ CD: Rajmund Cech, Lindengasse 8-11, Wien VII.
C. Rogister, 21, Ave. Golenvaux, Namur. Poŝteko Bruxelles 350 321.
Oni povas pagi al CD. portugala, aŭ rekte al UEA.
✓ CD: A. E. Hepton, 10 Linden Ave., Cottingham, Yorkshire.
✓ CD: R. K. Tričkov, ul. Knjaževska 63, Vratza, Bulg.
Peranto: Frant. Slavik, Praha, Uralské 9, poŝtekkonto 16204
Oni pagu rekte al C. O. de UEA. Genève.
✓ CD: A. P. Dueholm, Bryggervangen 4, København Ø.
Rekte al C. O. de UEA.
Vilho Setälä, Onnentie 23, Helsinki Kā, poŝtekkonto 6564
✓ D. Chagnoux, Yzeure s. A. poŝteko 99.86, Clermont-Ferrand.
Peranto: Fernando Montserrat, Provença 79, Barcelona.
Prof. P. Modesto Caroli, Mirandola, Modena.
✓ CD: R. Klajić, Svetog Save 23, Beograd.
✓ CD: J. Telling, Schietbaanlaan 106-a, Rotterdam poŝtekkonto 2416.19
✓ CD: L. E. Dust, 20 Chelsea Str. Mirmar, Wellington E-4.
Fino Selma Moscicki, 25 Zefania str Jerusalem.
✓ CD: Manuel de Freitas, Rua Monte da Lapa, 49-1. Porto.
Sin turni al Sino G. Harabagiu- str. Atena no. 1 Bucuresti.
Kosmos, för Universala Esperanto-Asocio, p. konto 44381, Göteborg-
(Korespondadoj al Einar Adamson, Värmlandsgatan 18, Göteborg.
Rekte al C. O. de UEA. Poŝteko: Genève I 2310
Al S-ro Alfredo Klein, Calle Uruguay 795, Montevideo.
✓ CD: J. Dubin, 34 S., 16 th Street, Philadelphia, Pa.

Internacia Korespondado

Ciu anoncanto havas la moralan devon respondi almenaŭ unufoje al ricevita korespondado pere de tiu ĉi anonco. Mal-longigoj: PI = poŝtkartoj ilustritaj, L — letero, PM = poŝtmarkoj, k. ĉ. l. — kun ĉiuj landoj.

*

Aarhus (Danlando) — S-ro L. Moesgard Larsen, Jagergaardsgade 138-I, PM., PI., L. k. ĉ. l. Interesiĝas ankaŭ pri PM katalogoj.

Bratislava (C.S.R., Slov.) — S-ro Ján Trebula, Uprkova 20, PI., k. ĉ. l.

Brno (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Miloslav Filka, Stojanova 6/III, PI., L., PM. amator. fotojn, gvidlibrojn, k. ĉ. l.

Buenos-Aires (Argentino) — S-ro Eriberto Garcia Bulnes 757, PI., PM., k. ĉ. l.

Bytčica okres Zilina (C.S.R., (Slovakio) — S-ro Rud. Horecky, oficisto, PI., filatelio, komerco.

Kysucké Nové Mesto (C.S.R., Slovenio) — F-ino Emilia Romanová, studentino, ulica 1 Maja 82, PI. k. ĉ. l.

Lietavska Lučka (C.S.R., Slovenio) — S-ino Rita Hodashova, PI., k. ĉ. l.

Pri Rajčianke 47 (C.S.R., Slovenio) — F-ino Elena Sadková, oficistino, PI.

Torino (Italio) — S-ro D-ro Mario Bonino, Via Saccarelli 31 PM., L., k. ĉ. l.

Voitsberg (Aŭstrio, Steiermark) — S-ro Johann Javernik, Hauptplatz 54, L., PI., PM.

Zemun (Jugoslavio) — S-ro Mehmed Jakupović, Mate Iviča br. 2, L., PI. Antaŭmilitaj korespondantoj volu skribi al li.

— Zilina, Slovenio — Ĉeĥoslovaka Respubliko

La sekvantaj adresoj estas ĉiuj samideanoj el nordslovaka urbo Zilina progresema centro industria-komerca.

S-ro Gabriel Adamica, Horný val 7, komercaj rilatoj.

S-ro Anton Biringier, studento, Stav 12, L., PK., vojaĝoj, skoltismo.

S-ro Dušan Blaško, drogisto, Bratislavská 1, L., vojaĝoj, skoltismo.

S-ro Ján Bohuš, tipografo, Ul. 1 Maja 9, L. kun kolegoj pri la fako.

S-ro Vojtech Bothgal, studento, Kmet'ova 6, L., PI., pri tekniko.

S-ro Daniel Brvenik, studento, ul. 28 Oktobra, PI., skoltismo.

S-ro Miro Chládecký, studento, Kmet'ova 36, L., PK., filatelio, skoltismo.

F-ino Marta Cimprichová, studentino, Pivovarská 3, L., sporto, muziko, skoltismo.

S-ro Vlado Durčanský, Rázusova 38, L., PK. skoltismo.

F-ino Melanie Dusíková, oficistino, Moyzesova 3, PI., k. ĉ. l.

S-ro František Fajta, studento, Rázusova 26, L., PK., arbarismo.

S-ro Ivan Friedl, studento, ul. 28 Oktobra no. 29, L., PK., skoltismo.

F-ino Tatjana Gabrielová, studentino, Rajecká 9, L., PK., pri muziko.

S-ro Rudolf Gella, presejestro, Hollého 20, PI., pres-industrio.

S-ro Ludovit Grof, studento, ul. 28 Oktobra no. 29, L., PK., tekniko.

S-ro Josef Hiker, oficisto, Dlabačová 27, L., PK., komerco, vojaĝoj.

F-ino Emilia Hlobenová, ulica 30 April no. 24, PI., skoltaferoj.

S-ro Milan Hodon, studento, Radlinského 2, L., PK., skoltismo.

S-ro Stanislav Holenda, studento, Stárkova 20, L., PK. filatelio skoltismo.

S-ro Pavol Holubec, studento, Sporthotel, L., PK., filatelio, skoltismo.

S-ro Otto Hudzik, studento, Legionarska 7, L., PK., skoltismo.

S-ro Eugen Husár, studento, Veľka okružna 32, L., PK., skoltismo.

S-ro RND-ro Ivan Janček, profesoro, Partizánska 12, L., kemio natursciencoj.

S-ro Ivan Janušek, studento, Dolný Val 38, L., PK., vojaĝoj, skoltismo.

S-ro Milan Janušek, studento, Dolný Val 38, L., PK., filatelio, skoltismo.

S-ro Ladislav Kačer, studento, Moyzesova 5, L., filatelio, skoltismo.

S-ro Jura Kafka, studento, Stav 15, L., PK., skoltismo, tekniko.

S-ro Václav Kalan, oficisto, Okr. Nár. Vyb. PI.

F-ino Maria Kalinová, oficistino, Kmet'ova 9, PI., k. ĉ. l.

F-ino Hana Karasová, studentino, Masarykova 5, L., PK., sporto, muziko, skoltismo.

S-ro Desider Káres, filatelisto, Moyzesova 3, L., filatelio.

S-ro Alex Keppert, studento, Prvého Maja 28, L., PK., skoltismo, tekniko.

S-ro Ladislav Kmecik, studento, Stefaniková 56, L., PK., kemio.

S-ro Ladislav Košecký, studento, Ambra Pietra 1677, L., PK., filatelio, skoltismo.

S-ro Stefan Košecký, studento, Ambra Pietra 1677, L., PK., vojaĝoj, skoltismo.

S-ro Peter Králik, studento, Veľka okružna 1575, L., PK., kemio.

F-ino Emilia Kubištová, virina tajlorino, Masarykova 25, L., PK., virina modo, fasono, kostumoj el Parizo, Romo

S-ro Karol Kučera, studento, Hodzova 20, L., PK., skoltismo.

F-ino Eva Kuntscherová, studentino, Veľka okružna 24, L., PI., skoltismo, filozofio, ktp., kun gestudentoj de ĉeflernejoj.

Skoltoj atentul!

En marto 1946 estis starigita la esp. fako ĉe Junák, asocio de ĉeĥoslovakaj skoltoj. Estroj de tiu ĉi fako estis nomitaj fratoj Fr. Buhr kaj St. Lešinger. Ambaŭ fra'oj longe propagandas esperanton inter skoltoj kaj estas komitatanoj de Esperanto — Asocio de Ĉeĥoslovaka Respubliko. Nun ni petas ĉiujn aliladanojn, ke ili subtenu nian laboron. — Klopodu fondi esperanto fakon ĉe via tuŝata skolta asocio.

Internacia Korespondado

Zilina, Slovenko (Ĉeĥoslovakio)

Ciuj sekvantaj adresoj rilatas al samideanoj en urbo Zilina, kion skribante oni aldonu, plie la landnomon!

- S-ro Jan Kurucár, studento, Rajecká 28, L., PK., pri skoltaj aferoj.
 S-ro Julo Langsfeld, studento, Sedláčkov sad. L., PK., arto, konstruado.
 S-ro Vojtech Lantoš, prokuristo, Slovenska poistovna, PI.
 S-ro Alex. Mallák, komerca-representanto, Moyzesova 25, PI.
 S-ro Josef Maršalko, Revolučná 11, L., PK., tekniko.
 S-ro Pavol Marik, oficisto, Stefaniková 36, PI., L., k. ĉ. l.
 S-ro Vlado Matejka, studento, Halašova 11, L., PK., kemio.
 S-ro Otto Melich, oficisto, štefaniková 51, L., PK., filatelio, skoltismo.
 S-ro Stefan Michalik, specialortopedisto, Pivovarská 3, PI.
 S-ro Juraj Minar, studento, Moyzesova 17, L., PK., entomologio, skoltismo.
 S-ro Imrich Ninis, studento, Stefaniková 56, PI, pri kemio.
 S-ro Frant. Pecho, grandkomercisto, Rajec, n. Rajč., PI.
 F-ino Judita Palovičová, oficistino, Kysucká 2, PI.
 S-ro Anton Pečalka, studento, ul. 28 Oktobra 17, L., PK., skoltismo.
 S-ro Dezider Páleník, autotransporto, pošt. priehr. 9, PI.
 S-ro Milan Peter, studento, Vel'ka okružná 5, L., PK., vojaĝoj, skoltismo.
 S-ro Jaro Pivko, studento, Moyzesova 15, L., PI., entomologio, skoltismo.
 F-ino Eva Procházková, studentino, Kukučínova 5, PI.
 S-ro Milan Raplík, studento, Lemešova 5, L., PK., filatelio, skoltismo.
 S-ro Karol Rätz, oficisto, Kakova 2, L., PK., filatelio, skoltismo.
 S-ro Karol Rizmann, automekanisto, Skoda-Autoservice, L., PK., vojaĝo, skoltismo.
 S-ro Marian Roštár, oficisto, Tvrdého 5, L., PI., pri ĉiaj temoj.
 F-ino Jozefina Rovňánková, Hviezdoslavova 3108, PI, k. ĉ. l.
 S-ro Karol Rozánek, Rütgers-továren, PI, skoltismo.
 F-ino Irena Sajdová, modistino, Vel'ka okružná 3, L., PK., virina modo, fasono, kostumoj parizaj, romaj.
 S-ro Alex Sklovsky, studento, Moyzesova 1, L., PK., turismo.
 F-ino Magda Sohlmannová, studentino, Kuzmányho 4, L., PK., pri muziko.
 S-ro Edo Sousedík, studento, Ul. 1 Maja no. 24, L., PK., skoltismo.
 S-ro Alojz Stopa, virina tajloro, Masaryková 25, L., kun samprofesiaĵoj pri la metio.
 S-ro J. Sagát, specialŝufaristo, Ul. 28 Oktobra, PI.

S-ro Ingeniero C. M. Simák, Klemensova 10, L., PI., pri botaniko.

S-ro Vlado Simák, studento, Klemensová 10, L., PK., skoltismo.

S-ro Josef Štefánik, oficisto, Bratia Zikmundovci, PI.
 F-ino Margita Tamasiova, studentino, Radlinského 17, L., PK., skoltismo, filozofio, ĉefe kun oriento.

S-ro Ivan Viecha, studento, Štefánikova 15, PI; fot-ajoj.

S-ro Ivan Willmann, studento, Milcova 17, L., PK., filatelio, skoltismo.

S-ro Imrich Zalupsky, redaktoro, Národná obroda, L., filozofio, filologio, redakciaj aferoj, PI.

S-ro Vojtech Ziaĥ, studento, Rázusova 60, L., PK., radio-amatoro, skoltismo.

S-ro Vlado Zikmund, studento, Klemensova 23, L., PK., muziko, filozofio, skoltismo.

Zlín (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Jaroslav Maškovsky, Stalinova 33, serĉas kontakton kun filatelioj en Lichtenstein kaj Luksemburgo kaj petas ke oni konigu al li adresojn.

Zutphen (Nederlandoj) — S-ro B. J. Kemperman, Diesersstraat 6, L., PK., pri ĉiaj temoj, PM., fot-ajoj, gazetoj, k. t. p. k. ĉ. l. Respondo garantiata.

Petoj kaj proponoj

Bibliografio de la Internacia lingvo. — Personoj povantaj vendi ekzempleron de tiu ĉi verko — elĉerpita — bonvolu sin adresi kun ofertoj al S-ro Juan Régulo Pérez, Gabrera Pinto, 30, La Laguna, Tenerife, Kanariaj Insuloj.

Ĉiu ne-katoliko interesas sin pri la doktrino de la katol. religio aŭ ties praktikoj, senpage povas ricevi informojn pri tio ĉe la INTERNACIA KATOLIKA INFORMEJO

Fraterhuis, Loonopzand, Nederlando.

Egiptujo. — Komercistoj kaj firmoj dezirantaj havi komercan rilaton kun tiu ĉi lando, skribu al D-ro Tadros Megalli, P. B. 450, KAIRO.

Ladovaroj. — Komercisto Mehmed Jakupovič, en Zemun, Mate Iviča 2, petas ke oni sendu al li katalogojn de firmoj kiuj produktas ĉiaspecajn ladovarojn. Rekompensas per uzitaj poŝtmarkoj.

Larousse Universel. — Duvoluma, lasta eldono, nova aŭ bonkonservita estas serĉata de A. Bavaud, 30 Charmilles, Genève, Svis.

Libro-interŝanĝo. — Portugala Eldona Rondo, Monte da Lapa 49-I, Porto, Portugalio sendos siajn popolklerigajn eldonaĵojn „La araneoj“ kaj „La vivo de la eskimoj“ 28 kaj 32 paĝa, kontraŭ samvaloraj Esp. libroj, uzitaj sed sendifektaj aŭ novaj. Respondekuponoj akceptataj. Unu libreto kostas 2 respondekuponojn, ses ekzempleroj kune 10 Resp. Kup. Ne-uzitaj puraj poŝtmarkoj estas ankaŭ akceptataj (prefere memorigaj) sed tiuokaze oni aldonu 20 %.